# Informilo de SES

(SES 通信＃138)　'15 / 8 / 1

## Saluton,　SESanoj !

Rememoro pri somero:
Rememoro pri somero estas eble pri montaroj por mi.
En Hidaka montaro troviĝas spuroj de glaĉeroj.　Kruta deklivo alta ol ĉ.1500m estas ie elkavita kiel taso.　La fundo estas plata kaj ĉirkaŭa deklivo estas tre krutega.　Ĉi tiu terena formo nomiĝas "Kar", kie estas tre bona kampadejo por ascendi supron.　Zono de Hidaka montaro konservas bone naturon kaj nenia trapenetra vojo troviĝas.　Eĉ se pado preskaŭ ne ekzistas.　Ni devas pasadi en riveroj kaj rivereto j, car piediri en densaj etbambuoj de arbaro postulas multe da energio al ni.　Estas tre agrable travadi en rivereto vidante naĝantajn fiŝojn sub la brila suno.　Ni ofte gojis tendarfajron kun amikoj en la Kar, kien ni apenaŭ atingis finfine post suprengrimpi akvofalon.
Mi iam supreniris Mt. Kamuiekuuĉikausi kun amikoj.　Ni volis tosti per biero kaj mi alportis ĝian 3L-botelon tre zorgeme kovritan per mia dormosako en mia dorsosako.　Mi pasadis tiel singarde ke mi senbatu la sakon kontraŭ io.　Kiam mi atingis Kar-on, mi estis tre trankvila kaj sidis sur roko.　Mi tiam audis teruran sonon "Gaĉa!".　Ni perdis grandan gojon kaj mi ricevis grandan riproĉon.　Ĉar mia dormosako estis tute malseka, mi ne povis dormi tiun nokton.

(H. Ŝ.)

\# 中野常明さんが長年に渡り広報掛として **SES** 通信の発行をして下さっていましたが、病後の体調が思わしくないとのことで退かれることになりました。　長い間のご奉仕を有り難う御座いました。